NUMERO 10
HAUTS-DE-FRANCE
08 NOV 2018

# NORDA ⭐ KURIERO

## Salouël inaŭguris la aleon Esperanto!







Sabaton la 6an de oktobro 2018 matene, sub brila kaj varma suno, kiu lumigis la frunton de Jean-Claude Roy kaj la vizaĝon de la prezidanto de la Amiena Metropolo Alain Gest, okazis inaŭguro de nova ZEO nomata "Aleo de Esperanto" en la urbo Salouël (Salŭelo) apud Amieno.

Ĝi situas inter la universitato Jules Verne kaj la superbazaro Leclerc, kie la studentoj aĉetas manĝaĵojn, kaj ankaŭ ne for de la studentaj loĝejoj. Kvankam neniu studento ĉeestis la feston, kompreneble tiu ZEO celas ilin! Sur la malsupra stratŝildo QR-kodo ebligas viziti la retejon de la landa asocio Espéranto France. Plie, la tri rubujoj apud la stratŝildoj surhavas la indikon "rubujo" laŭ iniciato de la magistrato!

Krom preskaŭ ĉiuj anoj de Espéranto 80, ĉeestis multaj magistratanoj de Salŭelo kaj ankaŭ bela delegitaro de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Post teatra dialogo inter Katja Boen kaj Jean-Claude Roy por prezenti la ĉefajn trajtojn de la lingvo, oni senvualigis la stratŝildojn. Sekvis la paroladoj de Alain Gest, Jean-Claude Roy kaj la federacia prezidanto Michel Dechy. La inaŭguro finiĝis per amikeca aperitivo inter la ĉeestantoj.

Esperebla la pasantoj sur tiu bela, verda aleo scivoleme informiĝos pri Esperanto, lernos, kaj eĉ aktivos en la Esperanta movado por pluvivigi la lingvon internacian en Francio kaj en la tuta mondo, ĉar sur tiu aleo pasas multaj eksterlandanoj.

La stratŝildojn kaj la inaŭguran feston financis la Nordfrancia Federacio. Ni vigle laboru por konstante kreskanta evoluo de nia komunumo. Nia lingvo internacia ne falu en la rubujon de la historio! Ni situas sur la bona aleo!

*✎ Adaptita el artikolo de Jean-Claude **Roy***

# La lingvoj bele festivalis en Araso!




Dimanĉon la 30an de septembro, suno brilas, la pordoj de la Arasa Kultura Oficejo malfermiĝas ekde la 9:00 matene. La unuajn vizitantojn bonvenigas la lingvo-festivalo organizita de Arras-Espéranto kun la monhelpo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Por festi sian 25-jariĝon la klubo prezentas dum la tago 25 lingvojn, t.e. po 5 lingvojn ĉiuhore. Jes ja, Esperanto defendas la lingvan diversecon!

Teretaĝe la publiko malkovras la lingvon Esperanto dank' al 6 kursetoj gvidataj de Arlette Plutniak, Katja Boen kaj Michel Dechy. Sume tiuj prezentoj allogas 34 interesatojn.

Pri la kultura riĉeco de nia lingvo atestas du ekspozicioj "Esperanto kaj la lingva diverseco", "Esperanto dum la unua mondmilito" kaj la libro-servo de niaj fidelaj belgaj amikoj Katja Lodor, Hans Delnat kaj Piet Glorieux.

Funde de la koridoro ornamita per belaj pentraĵoj "Méditations urbaines" (urbaj meditoj) de nia artisto Joëlle Muller, eta bufedo regalas la ĉeestantaron.

La salonoj de la unua etaĝo akceptas averaĝe po 10 homojn por la 24 lingvoj prezentataj tie en la tago.

Kia trankviliĝo konstati, ke ĉiuj animantoj estas akurataj, ke ĉiuj atelieroj akceptas kontentigan nombron da partoprenantoj! Kiom da pozitivaj eĥoj pri la kvalito kaj kompetenteco de la animantoj!

Kia plezuro akcepti tutan grupon da junaj vjetnamoj, kiuj venis bicikle por prezenti sian lingvon kaj regali nin per bela vjetnama melodio akompanante sin per gitaro!

Kia ĝuo, kiam la juna instruisto de la japana proponas dum sia prezento la "telefonludon" (france: *téléphone arabe*), t.e. rediri japanan frazeton ĉe la orelo de la najbaro!

Por fini tiun belan tagon, en la kapelo de la apuda muziklernejo de Araso, nia plurlingva kantisto JoMo fajrigas publikon de 4- ĝis 90-jaraĝa. La esperantistoj fieras, ke ekstera publiko malkovras tiun talentan artiston, kiu kantas por la okazo en 25 diversaj lingvoj!

Unu sola bedaŭro dum tiu bela tago: neniu ĵurnalisto venis por priskribi la eventon! Tamen antaŭe en pluraj lokaj gazetoj aperis bonaj artikoloj kaj intervjuo en la radio.

Arras-Espéranto rajtas fieri pri la informado rilate la eventon. Ĉu estos konsekvencoj? Ĉu novaj membroj aliĝos al nia asocio? Ne eblas scii nun, sed ni semis!

✎ *La klubanoj de **Arras-Espéranto***

# Forpasis nia amiko Lucien Giloteaux

Kun bedaŭro mi sciigas vin, ke mia patro Lucien Giloteaux forpasis la 3an de novembro 2018. Li lernis Esperanton en 1947, do antaŭ 71 jaroj!




Dum la tuta vivo li estis tre aktiva esperantisto. Li konatiĝis kun mia patrino dank' al Esperanto. Li foje instruis Esperanton, sed li plej ŝatis verki artikolojn. Li ofte kontaktis la lokajn ĵurnalojn kaj ankaŭ kunlaboris kun *Heroldo de Esperanto*.

Li multe vojaĝis. Lia unua Universala Kongreso estis en 1950, kaj poste li partoprenis multegajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Lia lasta Universala Kongreso estis tiu en Lillo en 2015, en kiu ankaŭ mi partoprenis.

Mi deziras kore danki Katja Boen, kiu tiom diligente vizitis mian patron dum la lasta jaro. Mia patro, kiu sentis sin iom soleca en la maljunulejo, ĉiam tre ĝuis babili kun Katja en Esperanto.

Mi aldonas foton de mia patro kun lia tre ŝatata skribmaŝino. Se vi deziras aŭskulti mian patron, spektu tiun filmeton kiun mi faris en Aŭstralio en 2009: www.youtube.com/watch?v=G_CiQ5sDqic

✏ *Nicole **Else**, filino de Lucien Giloteaux*

# La malnova borso iluminiĝis Esperante




Sabaton la 15an de septembro 2018 okazis en Lillo konkurso pri aŭdvida projekcio (*video mapping*) sur la fasado de la malnova borso. La kandidata skipo nro 4 el François Chetcuti kaj Prät Moskova projekciis sian verkon *Wak Wak*, en kiun ili enmetis dialogon kaj rapkanzonon en Esperanto, kun la enkonduka indiko "En Esperanto" (vd. la foton)! Fine, ili ricevis la ĉefpremion de la ĵurio. Gratulon al ili kaj dankon pro la aperigo de Esperanto kadre de tiu konkurso, kies temo estis: "La Arto Dividi"!

# Dennis Keefe prelegos en Araso kaj Lillo

La usona universitata profesoro Dennis Keefe alvenos en nordan Francion por renkonti la Esperanto-klubojn de Araso kaj Lillo! La esperantistoj konigos ambaŭ urbojn al li, kaj interŝanĝos kun li okaze de du prelegoj.

Li prelegos unue en Araso (Pôle culturel Saint-Pierre, 6 rue de la Douizième) **lundon la 12an de novembro** je la 18:00 pri la temo: "KOMO: Komuna Modelo (Ĉeesta kaj Reta) por Kompreni la Fenomenon Esperantistiĝo".

Poste li prelegos en Lillo (Maison régionale de l'environnement et des solidarités, 23 rue Gosselet) **mardon la 13an de novembro** je la 19:00 pri la temo: "Merkatiko Aplikata al Esperantujo".




# Lillo kiel ludejo por la Zamenhof-festo



La Nordfrancia Esperanto-Federacio kaj la Lilla klubo invitas vin festi la Zamenhof-tagon **sabaton la 15an de decembro** ekde la 17:00 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet, teretaĝe)! La temo de la festo estos: "Ludoj!".

La partoprenantoj povos ludi per diversaj ludiloj proponataj de la Lilla klubo. Sed ankaŭ ĉiu klubo devos kunporti almenaŭ unu ludilon por pliriĉigi la kolekton kaj amuziĝon!

Kiel kutime ĉiuj povos frandi diversajn trinkaĵojn kaj de membroj faritajn kukojn. Fine de tiu luda festo eblos komune vespermanĝi en proksima restoracio; por tio bonvolu antaŭanonci vin al Katja Boen.

Krome, antaŭ tiu programo, je la 14:30 samloke okazos kunsido de la Komitato de la Nordfrancia Federacio por diskuti kaj decidi pri aferoj de la regiona Esperanto-movado.

# "Unuiĝinta en diverseco"

Jen estas la devizo de Eŭropo. Ĝi estis elektita en 2000 inter 2016 proponoj submetitaj al 2500 lernejoj.

Tiuj infanoj estas hodiaŭ inter tridekjaraj kaj kvardekjaraj. Nu, por ili, la Eŭropa konstruado iĝas pli kaj pli utopia, dum ĝia ekzistado iĝas pli kaj pli nepre necesa.

Eŭropo konstruiĝis ĝis tiam, ĉar neniu lando havas hegemonian volon. Ne estas la sama situacio ĉirkaŭ ni.

Ĉu ni devas mallevi la brakojn?

En 1917 L. L. Zamenhof diris, ke la sola rimedo por atingi daŭran pacon konsistas el eliminado por ĉiam de la ĉefa kaŭzo de militoj: superregado de iuj popoloj fare de aliaj popoloj.

Aparte por tio li kreis Esperanton. Hodiaŭ tiu utopio estas ankaŭ realaĵo.



Granda debato komenciĝis rilate la eŭropan civitanecon. Ĉu estus la momento por alproksimigi Eŭropon kaj Esperanton?

✎ *Daniel* ***Calvos***

# Kial Toki Pona?

Kial interesiĝi pri Toki Pona, kiam oni havas tian mirindan lingvon Esperanto? La fakto estas, ke multaj homoj simple ne kapablas prononci Esperanton, ekzemple ĉinoj. Por ili "d" kaj "t", "b" kaj "p" estas la samaj fonemoj, ili tute ne aŭdas la diferencon; kaj la vortoj *sklavo*, *artrito*, *okdek*, estas teruraj por ili (tro da konsonantoj).

Tial iu juna lingvisto elpensis novan tutmondan lingvon kun prononceblan de ĉiu Terano fonologion. Nur 14 fonemoj! Sed jen problemo : la vortprovizo iĝas ege limigita. Tio ne zorgigas la aŭtoron, Sonja Lang. Tute male. Por ŝi Toki Pona rezultas el ŝiaj streboj "kiel eble simpligi sian menson". Nur 120 vortojn entenas la lingvo! Kompreneble tio ne ebligas prelegojn pri nuklea fiziko aŭ jurajn disputojn: tiuj estas seriozaj aferoj, kiuj ne taŭgas por la ĉarma eta lingvo Toki Pona. Do ne timu: Toki Pona neniam konkurencos nian karan Esperanton.

Ĉiuokaze la prezento de la minimalisma lingvo dum



la lingvo-festivalo* altiris ne malmultajn scivolemulojn, kelkajn eĉ kun lernolibro. Ili tuj komencis krei frazojn per la disdonitaj vortoj. Inter la lernantoj estis JoMo, kiu aldonis interesajn faktojn pri la fontoj de Toki Pona.

✎ *Marianne* ***Dunlop***

* Marianne Dunlop gvidis kurson de Toki Pona en la lingvo-festivalo, kiun la Arasa klubo organizis la 30$^{an}$ de septembro 2018 (legu p. 2).

# Nova kotizosistemo por norda Francio

La 16an de junio 2018 la membraro de la Nordfrancia Federacio decidis aligi la Federacion kaj ĝiajn klubojn al la interasocia kotizosistemo proponata de la landa asocio Espéranto France.

Konsekvence, per unu aliĝilo (tiu de Espéranto France) kaj per unu kotizpago oni estas membro de tri asocioj: la landa, la regiona kaj la loka! Plie, tiu procedo malplialtigas la tutan kotizosumon.

La Nordfrancia Federacio estas en Francio la unua regiona federacio, kiu plene kun siaj membraj kluboj aliĝis al la interasocia kotizosistemo!

Por (re)membriĝi al via klubo, petu la interasocian aliĝilon al via klubestro aŭ vizitu la landan retejon:
www.esperanto-france.org


espéranto France
espéranto Jeunes
Bulletin d'adhésion
2018-2019
Espéranto-France • 4 bis, rue de la Cerisaie • 75004 Paris
Tel : 01 42 786 886 • info@esperanto-france.org
esperanto-france.org

# Francio kongresos en Anglio!



Ĉiujare kongresas la Unuiĝo Franca por Esperanto (Espéranto France). Jam dufoje ĝia kongreso okazis en Germanio komune kun la Germana Esperanto-Asocio, kio igas la aranĝon kaj la uzon de Esperanto des pli entuziasmigaj.

Venontan jaron la franca kongreso okazos komune kun la brita kongreso en la havenurbo Dovro! Tiu trans-Manika renkontiĝo daŭros **de la 12a ĝis la 16a de aprilo 2019**.

Baldaŭ en la retejo de Espéranto France haveblos informoj pri la programo kaj pri la aliĝo. Michel Dechy, prezidanto de la Nordfrancia Federacio, kontribuos en la organiza rilato inter la franca kaj la brita asocioj.

K O L O F O N O

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas kvarfoje en jaro: januare, aprile, julie kaj oktobre.

Ĉefredaktas: **Katja Boen** kaj **Xavier Dewidehem**.
Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn, anoncojn, raportojn, artikolojn kaj fotojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso:

**kuriero@esperanto-nord.org**

ĝis la unua dimanĉo de januaro, aprilo, julio kaj oktobro.